

V-19479

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

Kun E-kantoj
kaj parolo
en Pleven

Fruktodona
raport-elekta
kampanjo

Emil Ŝeker-
gijski eterne
en niaj koroj

Georgi Dimit-
rov pri la
E-movado

Antaŭen,
popolo
renaskiginta!..

Pri E-lernado

Enlanda
movado

Lingvaj
problemoj





KUN E-KANTOJ KAJ PAROLO EN PLEVEN

En Pleven la vintro jam cedis lokon al la printempo. La florantaj salikoj amike bonvenigis nin. Jam ĉe la stacidomo ni konstatis, ke en la urbo nun regas la verda koloro de E-afiŝoj kaj standardoj kaj la bonhumoro, kiun elradiis la esperantista juneco de Bulgario. Ĉar en Pleven de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo j.k. renkontiĝis pli ol 200 junaj geesperantistoj el 22 distriktoj de la lando dum la XV Nacia Revuo de la E-Kanto kaj Parolo.

La Revuo estis solene inaŭgurita en la salono de la Sindikata Kulturdomo. Sur la podio okupis lokojn Ivan Kirkov — gvidanto de fako „Scienco kaj Klerigo“ en la Distrikta Komitato de BKP, Kunčo Valev — ĝenerala sekretario de CE de BEA, Stojan Kostadinov — prezidanto de la Sekcio de Esperantistoj-Veteranoj ĉe BEA, Marin Reŝevski — instruiciisto en fako „Propagando“ en la Komunuma Komitato de BKP, Stojko Dančev — ĉefredaktoro de la distrikta gazeto „Septemvrijska Pobeda“. Ĉeestis ankaŭ alilandaj gastoj — esperantistoj, reprezentantoj de ĝemelaj urboj: d-ro Lubomir Holeva el Ĉeĥoslovakio, Jovan Jankoviĉ kaj Jovan Neŝiĉ el Jugoslavio, Gerhard Bötscher el GDR kaj Elizabet Palos el Hungario.

La solena inaŭguro de la Revuo komenciĝis per tradicia bulgara popolkutimo — bonvenigo de partoprenantoj kaj gastoj per „pano kaj salo“. Ok knabinetoj el infandomo „Ruĝa Stelo“ en Pleven vestitaj en naciaj kostumoj, prezentis karakteran „dancon de la pano“, elmontrante ne nur la gastamon de la dommastroj, sed ankaŭ veran dancalenton. Grupo da etaj dancistoj plenumis literaturan-muzikan programeton en Esperanto.

En la salono regis agrabla festa etoso kaj la ĉeestantoj longe aplaudis la plenumojn de la etuloj.

La vic-prezidanto de BEA — ing. Petar Todorov donis la parolon al Dimitar Genov — vic-prezidanto de la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo, por oficiala inaŭguro de la XV Nacia Revuo de la E-Kanto kaj Parolo. Tre bona estis la salutparolo de Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA, en la nomo de ties Centra Estraro. Steliana Dimitrova — prezidantino de la Junulara Sekcio ĉe BEA, esprimis varman dankon al la soci-politikaj organizaĵoj kaj entreprenoj, kiuj helpis por la organizado kaj realigo de la Revuo.

En la nomo de la eksterlandaj gastoj Elizabet Palos salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris sukceson al la partoprenantoj en la

Revuo, kiun ŝi difinis kiel „unika laŭ siaj karaktero kaj celoj esperanta festivalo“.

Post la tradicia „komuna foto“ la ĉeestantoj esprimis sian profundan estimon kaj rekonon al la faro kaj la memoro de la pereintaj por la libereco de Bulgario herooj, metinte florkronojn kaj freŝajn florojn sur la Komunan Tombejon de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj antaŭ la busto de la poeto-partizano Cvetan Spasov.

ĈU LA REVUO ESTIS SUKCESA?

ĈU NIAJ E-REVUOJ EVOLUAS KAJ PROGRESAS?

Por kompetentaj pritaksoj kaj opinioj ni donu la parolon al membroj de la ĵurio, al la dommastroj kaj al la alilandaj gastoj.

Dončo Ĥitrov — prezidanto de la ĵurio por etuloj:

— Antaŭ ĉio mi deziras substreki la bonan preparlaboron de la dommastroj de la Revuo, precipe de la Distrikta kaj Urba Estraro de BEA kaj de iliaj prezidantoj — la ĵurnalisto Venecij Georgiev kaj d-rino Emilija Kanjovska. Ni devas kore danki al la Distrikta kaj Urba Komitatoj de BKP, de la Konsilantaroj de la Sindikatoj kaj la Komunumo, de la direktoj kaj la laborokolektivoj de multaj fabrikoj kaj entrepreno en Pleven pro ilia preteco helpi la sukcesan realigon de la revuo, pro la valoraj donacoj, kiujn ili faris al la premiitoj en la nobla konkurado.

Do, la prezentado de la kolektivoj, grupoj, grupetoj kaj de individuaj plenumantoj en la unuaj du kategorioj (de I ĝis IV kaj de IV ĝis VIII klasoj) komenciĝis en la salono de la Domo de Popola Armeo. Neniu povus resti trankvila kaj apatia antaŭ la ĉarma sincereco, natureco kaj entuziasmo, kun kiuj kaj unuo-

(Sekvas sur p. 2)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

M A J O

5 • 1982

FRUKTODONA RAPORT-ELEKTA KAMPANJO

DIMITAR PAPAŖOV,
sekretario de CE de BEA

De la 15-a de novembro 1981 ĝis la 20-a de marto 1982 en la E-societoj kaj organizaĵoj okazis raport-elektaĵ kunvenoj kaj konferencoj. Lige kun ilia preparo la CE de BEA donis specialajn direktivojn, kiuj havis la celon garanti altan nivelon de la raport-elekta kampanjo.

Plenumante ilin, la Distriktaĵ Estraroj okazigis anticipajn plenkunsidojn kun parloprezo de membroj de la Buroo de CE de BEA, en kiuj oni pritraktis la demandojn pri la antaŭstarantaĵ kunvenoj kaj konferencoj. Estis akceptitaj planoj pri la preparlaboroj kaj estis elektitaj komisionoj por preparo de kompleksaj laborprogramoj por la periodo 1982-1984. Oni respondece alpaŝis al formado de novaj konsistoj de la societaĵ kaj distriktaĵ estraroj, pridiskutante kelkfoje la proponojn. La raportojn kaj la ceterajn materialojn preparis ne unu aŭ du aktivuloj, sed ordinare ili estis kolektiva laboro.

Dank' al la anticipa organiza laboro en la plimulto de la distriktaĵ E-organizaĵoj la raport-elekta kampanjo pasis je alta nivelo. La ĝenerala pritakso pri la kunvenoj kaj konferencoj estas kontentiga. La labormaterialoj por la kunvenoj kaj la konferencoj estis bone preparitaj, precipe de la E-societoj en Trojan, Sevlievo, Galabovo, Drjanovo, Stanke Dimitrov kaj de la DE en Varna, Sofio-urbo, Pleven, Pazarĝik, Loveĉ k. a. La raportoj — analizaj kaj kritikaj, prezentis la sukcesojn kaj la mankojn.

La decidoj, akceptitaj en la kunvenoj de la E-societoj kaj la kompleksaj programoj, aprobitaj de la distriktaĵ raport-elektaĵ konferencoj en Plovdiv, Varna, Blagoevgrad, Sliven, Pazarĝik k. a. promesas ĝustan kaj celkonforman agadon dum la antaŭstaranta periodo.

Sangiĝis ankaŭ la konsisto de la novaj estraroj. Ili kompletigis per novaj kaj pli junaj iniciatemaj membroj.

La informoj ricevitaĵ ĝis nun en la CE de BEA montras, ke 36% el la membroj de ĉiuj SE estas malpli ol 35-jaraj. Tiu ĉi plijunigo kaj plinovigo de la gvidkadroj ne okazis at-

bitre, sed konforme al la principoj de kontinueco de la kadroj. La novaj kaj junaj E-aktivuloj povos ĉerpi konojn kaj spertojn de la jam elprovitaj malnovaj kadroj, kiuj restis en la diversaj estraroj. Tiu ĉi raport-elekta kampanjo montris ankaŭ alian tendencon — altiĝon de la ĝenerala kleriga nivelo de la E-aktivuloj. Dum la kampanjo estis ankaŭ malperfektaĵoj, ligitaj precipe kun la nesufiĉa disciplino de iuj estraroj, kiuj okazigis malfrue siajn kunvenojn kaj konferencojn. Ne ĉiuj societaĵ kaj distriktaĵ estraroj sendis ĝustatempe al la CE de BEA la materialojn de la kunvenoj kaj konferencoj, konsistoliston de la novaj estraroj kaj la adresojn por korespondado. Tio vere malfaciligas la ĝustatempan instrukciadon flanke de la CE kaj la informadon de la SE kaj DE.

En la preparperiodo de la raport-elekta kampanjo kaj tuj post ĝi venis jam pozitivaj rezultoj — la E-societo en Kargali akiris novan klubejon, en Sofio ekfunkciis kelkaj instruistaj E-kursoj — necesa kondiĉo por sukcesa fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejoj, oni bone organizis E-arangojn en Ruse kaj Loveĉ, revigligis la E-agado en Mihajlovgrad-distrikto, aperis interesaj ideoj pri novaj iniciatoj en la distrikto de Stara Zagora ktp.

Nun la plej grava tasko estas realigo de la societaĵ planoj kaj de la kompleksaj programoj. Tre grava tasko estas ankaŭ la preparo de la E-aktivularo. Tiudirekte la CE de BEA jam lanĉis iniciatojn. Kun granda sukceso pasis en Plovdiv la organiza seminario por reprezentantoj de E-societoj el la tuta lando. La sekva seminario — por respondeculoj de la DE pri diversaj fakoj organizigis en la Internacia E-kursejo en Pisanica. Similajn arangojn devus organizi sur sia teritorio ankaŭ la DE por siaj aktivuloj.

Tiu ĉi raport-elekta kampanjo estas bona komenco de la antaŭstaranta raport-periodo. Ĝi permesas al ni kredi, ke la E-societoj kaj organizaĵoj atingos novajn sukcesojn en sia estonta agado.

KUN E-KANTOJ KAJ PAROLO EN PLEVEN



Belarta muntaĵo de artgrupo el Burgas

(Daŭrigo de kovrilpaĝo II)

puloj, kaj kolektivoj plenumis siajn programojn. Sur la scenejo aperadis geinfanoj (kun la verda stelo surbruste), kiuj pasie kaj ambicie recitis kaj kantis. Sonoradis versoj kaj kantoj pri la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov; sonis la voĉetoj de la etaj artistoj glorie al Esperanto, al la 75-jara jubileo de la Bulgara Esperantista Asocio. Spektantoj, plenumantoj kaj membroj de la ĵurio — ĉiuj en la salono kaj sur la scenejo sentis la ambicion sin prezenti kiel eble plej bone. . .

Tutkompreneble (kaj tutnature!) ne ĉiuj plenumantoj montris altan artnivelon kaj ne ĉiuj montris artistajn kvalitojn, merittajn la pozitivan prijuĝon de la ĵurio kaj de la spektantoj. Sed estis ankaŭ veraj talentoj, kiujn oni tuj eksentis — de la unuaj momentoj de la plenumado.

Jes, sinceraj kaj kortuŝaj estis ĉiuj plenumoj, sed nia devo estas fari iujn konkludojn kaj komparojn pri la XV Nacia Revuo de la E-Kanto kaj Parolo.

La amasa partopreno de gelernantoj kaj gejunuloj el diversaj loĝlokoj de la lando estas senduba pruvo pri la disvastigo de Esperanto inter la junularo, pri la plivigliĝo de ties intereso al la Internacia Lingvo, per kiu ili manifestas sian artan emon, realigas siajn artajn kvalitojn kaj talenton.

Estas ĝojiga la fakto, ke por dekkvina fojo oni organizas tiun unikan E-aranĝon en nia lando, kiun partoprenas pli kaj pli novaj artaj fortoj. Sed ni devas serioze pritaksi ĝian organizan kaj artan nivelon, por povi atingi pli bonajn rezultojn kaj garantii al ĝi evoluon.

Ni disponas pri abunda kaj riĉa „materialo“, pri sincera kaj arda entuziasmo, sed evidente tio ne sufiĉas. Se ni estus pli pretendemaj, ni devus konfesi, ke la arta kaj lingva sinprezentado de I kaj III grupoj estis, ĝenerale dirite, je malalta nivelo. La plenumoj montris du flankojn de sinprezentado: aŭ tro patetika, kun pli ol necese laŭtvoĉa eldiro (ĉe la plej etaj), aŭ malvigla. Krom tio — evidente nesufiĉa zorgo pri la lingva

majstreco. Ne en la lasta loko ni devas pri-
taksi la mankon de zorgo pri la eksterajo de
la plenumantoj — ĉu kolektivaj, ĉu indi-
viduaj.

Ni povus fari ankoraŭ kelkajn kritikajn
rimarkojn, sed eble pli bone estus, se ni donus
la parolon al

Kunĉo Valev — prezidanto de la ĵurio por III kaj
IV grupoj:

— Ankaŭ la ĉi-jara — XV laŭvice — Revuo
de la Esperanta Parolo kaj Kanto pasis suk-
cese. Vere, la bulgaraj esperantistoj jam havas
riĉan praktikon kaj povas ne nur tiri utilajn
konkludojn el ĝi, sed ankaŭ realigi tiujn
konkludojn por ĉiufanke plialtigi la nivelon
de niaj Revuoj.

Se oni dezirus kompari la ĉi-jaran kun la
pasintjaraj Revuoj, oni nepre devas noti
certan progreson. Sed tamen tiu progreso tute
ne estas sufiĉa, ĝi staras malproksime de tio,
kio estas objektive ebla kaj dezirinda.

Sur la podio de la ĉi-jara Revuo ne ĉiam
la artverkoj estis prezentitaj sufiĉe arte, iufoje
regis grizeco. Ofte la lingvaj kaj mimikaj
rimedoj estis palaj. Ĉe kelkaj recitantoj oni
povis observi tedajn paralizitajn gestojn,
kiuj aparte malbeligas la plenumadon. Iufoje
oni kriegis kvazaŭ surkampe, alfoje oni
flustris neaŭdeble. En apartaj okazoj la pro-
nonco ne estis sufiĉe klara, kun netolerebla
reduktado de vokaloj, kun nekorektaj ak-
centoj. Foje oni arbitre disŝiris la logikan
tuton en vortgrupojn, kio malfaciligas la
komprenon de la teksto. Kantante oni ne
ĉiam sufiĉe zorgis pri la klara, komprenebla
prononco de la vortoj.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj de la nesufiĉe bona
nivelo de la programoj estas — kiel ĝis
nun! — la malfrua komencigo de la preparla-
boroj. Ĉar la Revuo estas ĉiujara, oni ankaŭ

ĉiujare devas ĝustatempe ekzorgi pri ĝi. Jam en
decembro la E-societoj devas scii sian pro-
gramon. Tio aparte gravas pri la kolektivaj
programoj. Konsiderante la okupatecon de
la homoj (oficistoj, laboristoj, lernantoj k. a.),
oni devas disponi pri almenaŭ tri monatoj
por prepari kolektivajn programojn.

La dua grava kaŭzo de la ne alta nivelo
estas la fakto, ke la plejmulto de la distrik-
taj kaj societaj estraroj ne serĉas sisteme
la helpon de kompetentuloj — reĝisoroj,
artistoj, muzikistoj, pedagogoj k. a. Sen tiu
helpo oni ne povas fari seriozan paŝon antaŭen.
Ankaŭ la helpon de filologo oni ne neglektu —
li devas prizorgi la lingvan flankon de la
materialoj.

Alia kaŭzo estas la nesufiĉeco de konvenaj
materialoj por la programoj. Estonte la
Centra Estraro de BEA devas sisteme pri-
zorgi tiajn materialojn. Ili, kiel ankaŭ la
temoj de la Revuoj, devas esti dissendataj
jam en oktobro. Nur tiam la E-societoj povos
en decembro klare difini sian programon por
la Revuo.

Alia grava demando, pri kiu oni devas
serioze pensi, estas la variigo de la formoj.
Ne sufiĉas nur recitado kaj kantado. En ĉiu
Revuo nepre devas okazi ankaŭ konkurado
pri oratora arto, kio aparte grave kontri-
buas por plialtigo de la lingva nivelo de la
esperantistoj. En la Revuon oni devas enkon-
duki ankaŭ konkuron pri verkado de teks-
toj kaj komponado de melodioj por E-
kantoj. Ankaŭ aliajn formojn oni devas serĉi.
Ĉio ĉi pliriĉigos niajn E-Revuojn, plifortigos
ties idean kaj artan efikon.

Do, ni lernu el niaj eraroj kaj man-
koj. Ni batalu kontraŭ ili tiel obstine,
kiel ili obstine ripetigas. La idealo neniam
estas atingebla, sed ni strebu plenforte al
ĝi. Tio ĉiam donas bonajn fruktojn.

Pleven—Sofio, aprilo, 1982

RADI BANĈEVSKI
MARIA BOJAĜIEVA



La partoprenintoj en la XV Revuo de E-Kanto kaj Parolo en Pleven

LISTO DE LA PREMIITOJ

EN LA NACIA REVUO DE LA E-PAROLO KAJ KANTO

INDIVIDUAJ PREMIOJ

1-4 KLASOJ

RECITADO

- II Teodora Ruseva — Varna
III Janka Kaleva — v. Dabovo, distrikto de Stara Zagora
Kuraĝiga — Tonka Dimitrova — Ĥaskovo

5-8 KLASOJ

RECITADO

- I Gjulten Kerimova — Targovište
Angelina Veselinova — Pazarĝik
II Jordanka Stoeva — v. Bratanica, distrikto de Pazarĝik
Jordanka Dimova — V. Tirnovo
III Darinka Radenkova — Svoge
Diana Slaveeva — Svoge
Rumjana Bogdanova — Orjaĥovo
Kuraĝiga — Elena Rubanova — Petriĉ
Liljana Pavlova — v. Bratanica, distrikto de Pazarĝik
Diĉo Gambazov — Zlatograd

KANTOJ

- II Nikolina Tomova — v. Bratanica, distrikto de Pazarĝik
III Neli Ĉolakova — Velingrad
Kuraĝiga — Silvia Meĉkarska — Velingrad

9-11 KLASOJ

18-35-JARAJ

RECITADO

- I Antoaneta Panova — Gorna Orjaĥovica
II Rajniĉka Kalojanova — Sofio
Valentina Ivanova — V. Tirnovo
Verĵinija Dokova — Vidin
III Petja Krumova — Jambol
Gjulsun Ĥasanova — Pomorie
Veselina Vladislavova — Pleven
Nikolina Taseva — Ĉepelare
Pavlina Makaveeva — Levski
Denis Kostadinova — Botevgrad
Vasilka Pavlova — v. Bratanica, distrikto de Pazarĝik
Kuraĝiga: Angelina Gjurova — v. Skutare, distrikto de Plovdiv
Stefka Karaivanova — Galabovo
Silvana Ivanova — Ĉepelare
Tatjana Georgieva — Botevgrad

KANTOJ

- I Balina Kasamska — Smoljan
Elena Gogova — Petriĉ
II Dobrinka Todorova kaj
Natalia Tiškova (dueto) — Miĥajlovgrad
Kuraĝiga: Galja Vasileva kaj
Maria Rusanova (dueto) — Ruse
Milan Makedonski — piano — Pleven

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

RECITADO

5-8 KLASOJ

- I Ensemblo el Pernik
Kuraĝiga — Ensemblo el Ĥaskovo
Ensemblo el v. Skravena, distrikto de Sofio

KANTOJ

- III Ensemblo el Svoge
Ensemblo el Velingrad

KOLEKTIVAJ MUNTAĴOJ

1-4 KLASOJ

- II Ensemblo el Varna
III Ensemblo el Pleven

5-8 KLASOJ

- I Ensemblo el Madan
III E-grupo el Kneja

9-11 KLASOJ

18-35-JARAJ

- I E-grupo — Smoljan
II E-grupo — Sofio
III E-grupo — Svoge
E-grupo — Pleven
E-grupo — Jambol
Kuraĝiga — Dimitar Miĥajlov el Jambol — por melodio al teksto de muntaĵo

ĤOROJ

- I E-ĥoro — Petriĉ
III E-kantgrupo — Burgas

AMATORAJ FOTOJ KAJ FILMOJ

- I — Kolora amatora filmo „La Verdaj Epoletoj“
II — Kolora amatora filmo „Leteroj“
— Esperanta Amatora Foto-Kino-klubo „Evridika“
ĉe la DE de BEA en urbo Smoljan

DU SPECIALAJ PREMIOJ

- Kantistino Elena Kojuharova kaj pianisto-akompananto Boris Budiĉev — membroj de blindula E-societo — Varna

JURIO PRI I KAJ II GRUPOJ:

- Prezidanto: Donĉo Ĥitrov
Membroj: Veselina Kurteva
Dimitar Denĉev

JURIO PRI III KAJ IV GRUPOJ

- Prezidanto: Kunĉo Valev
Membroj: Maria Angelova
Mišo Zdravev

EMIL ŠEKERGIJSKI — ETERNE EN NIAJ KORJOJ!...

NANO KJUČUKOV,
vicprezidanto de BEA



Li naskiĝis antaŭ sepdek jaroj. Jam dek-sesjara li eniras la vicojn de la junulara revolucia movado. Baldaŭ li estigas membro de la gvidkomitato de RMS (Junulara Laborista Unuiĝo) en Unua Sofia Gimnazio kaj gvidanto de fako ĉe Unua Regiona Komitato de RMS en la ĉefurbo. Sekretario de la RMS-organizaĵo en la Jura Fakultato; membro de la urba gvidantaro de BONSS (Bulgara Tutpopola Studenta Unuiĝo); studento en Belgrado kaj batalanto por la unueco de la junularo sur la Balkanoj; gvidanto kaj rajtigito de la Komisiono pri Agitado kaj Propagando ĉe CK de RMS; prezidanto de la Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto en Kjustendil, politika komisararo de la Kjustendila partizana taĉmento — jen estas la plej gravaj momentoj el la biografio de tiu profesia revoluciulo.

Revenante al la vivo kaj la agado de Emil Šekergijski dum la tiama streĉa kaj maltrankvila periodo de kruela duelo inter la klasaj fortoj de la progreso kaj la reakcio en nia lando, ni nepre malkovros la valorajn virtojn,

kiuj ornamas la homon-komuniston — modeste-co kaj abnegacio, principeco kaj senkompro-miseo, klasa necedemo, morala pureco, senprofitemo, firma volo por batalo kaj venko, por pura kaj sankta bulgara-soveta amikeco, ĉiufankaj kulturaj intereso. Emil estas RMS-a kaj partia funkciulo, organizanto kaj ĵurnalisto, publicisto kaj redaktoro, tabaklaboristo kaj literatura kritikisto, ŝtontaj-listo kaj kultur-kleriga aganto, konstru- kaj fabriklaboristo, aktiulo de la abstinenco movado, juna scienculo, batalanto sur la ideologia fronto — koncize dirite: digna reprezentanto de la juna popola inteligentularo. . .

Grandaj estas la meritoj de Šekergijski al la bulgara revolucia publicistiko. Dum pli ol dekkvin jaroj lia nomo regule aperas sur la paĝoj de la bulgara progresema gazetararo kaj efikas favore sur miloj da ĝejnuloj, komsomolanoj kaj senpartiaj kontraŭfaŝistoj. Ili kontribuas al la edukado, al la idea kaj klasa formigo de la bulgara junularo sub la standardo de la Komunisto Partio.

En la antaŭvespero de la Dua Mondmilito Emil Šekergijski verkis libron pri la apostolo de la bulgara nacia revolucio Vasil Levski. Šekergijski altiras la atenton al la majesta figuro de Levski, ĉar lia ekzemplo de patrioto kaj revoluciulo havas ekskluzivan signifon por la revolucia edukado de la junularo kaj por ties sinpreparo al la antaŭstarantaj streĉa klasbataloj.

Kiel literatura kritikisto Emil Šekergijski kunlaboris al la demokratia gazetararo per artikoloj, eseoj kaj recenzoj pri diversaj libroj. La Komsomolo komisiis al li klarigi la novan Dimitrov-linion de partia agado inter la progresema junularo, tial Šekergijski fondis la eksterlegan literaturan rondon „Ĥristo Smirnenski“, kiun partoprenis la nun elstaraj verkistoj Veselin Andreev, Valeri Petrov, Pantalej Zarev, Kamen Kalĉev k. a. Multajn valorajn konsilojn kaj sugestojn lige kun sia krea laboro ili ricevis de Šekergijski.

Al la bulgaraj RMS-anoj kaj komunistoj de la 40-aj jaroj kaj dum la periodo de armita kontraŭfaŝisma batalo estas bone konata la broŝuro „Kiel eviti areston kaj kiel kondukti antaŭ la polico“, kies aŭtoro estas E. Šekergijski. Entenanta la revoluciajn spertojn de la partio, multfoje transskribata mane kaj disvastigata

tra la tuta lando, ĝi inspiris al la batalantoj kontraŭ la faŝismo heroan firmecon por elporti la turmentojn en la policejoj.

Laŭ la rememoroj de liaj intimaj amikoj Stela kaj Mojs Benvenisti Emil Sekerĝiĵski ĉiam estis en la E-vicoj. Sian unuan lecionon de Esperanto li ricevis en la kurso de la konata bulgara esperantisto Ljuben Ĉomakov. Jam sperta esperantisto, Emil komencis larĝskalan E-korespondadon, pri kio atestas lia tiama korespondanto d-ro Stojan Moraresku. Kiel redaktoro de ĵurnalo „ŝar“, batalanta por unuigo de la bulgara junularo en vastan kontraŭfaŝisman fronton, Emil donis lokon al artikoloj, dediĉitaj al Esperanto kiel grava kultura faktoro por interkonatiĝo kaj interfratiĝo de la popoloj. Sur la paĝoj de la sama ĵurnalo estas publikigitaj ankaŭ informoj pri la organiza vivo de E-societoj en diversaj loĝlo-

koj de la lando, fotoj de E-kursoj k. a. La redakcio promesis malfermi E-kurson sur la paĝoj de la ĵurnalo mem. Laŭ instigo de Emil Sekerĝiĵski la elstara bulgara esperantisto-veterano Ivan Keremidĉiev-Esperov estigis redaktoro de la semajnaj E-paĝoj de la sofiaj ĉiutagaj ĵurnaloj „Nova Kambana“ (Nova Sonorigo) kaj „Zarja“ (Aŭroro).

Emil Sekerĝiĵski pereis en la kontraŭfaŝisma batalo kiel Botev — kun plumo kaj glavo en la manoj! La ostoj de la 32-jara politika komisararo kaj verkisto nun kuŝas en la komuna tombejo-monumento en la Parko de Libereco en Sofio kune kun la ostoj de aliaj 16 naciaj herooj.

Lia nomo de flama komunisto kaj patrioto eterne brilos en la panteono de nia libera kaj fiera patrolando Bulgario.

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EL ĜEMELAJ URBOJ

Por unua fojo laŭ iniciato de BEA la 4-an de aprilo j. k. en Pleven okazis renkontiĝo de esperantistoj el ĝemelaj urboj el socialismaj landoj.

Niaj karaj gastoj Elizabet Palos (Hungario), Gerhard Böttscher (GDR), d-ro Lubomir Holeva (ĈSSR), Jovan Neŝić kaj Jovan Janović (Jugoslavio), kiuj partoprenis la XV Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto, kune kun reprezentantoj de la CE de BEA kaj de kelkaj DE de BEA, okazigis sian unuan kunsidon kaj pridiskutis problemojn gravajn por la disvastigo de la ĝemela agado inter esperantistoj el socialismaj landoj kaj ĝian pluan firmigon. Ili estis akceptitaj oficiale de la vicprezidanto de la Plenumkomitato de Distrikta Popola Konsilantaro kaj prezidanto de la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo Dimitar Vasilev. Li konigis al la gastoj la historion kaj la nuntempon de Pleven kaj respondis al multaj demandoj, kiujn starigis la partoprenantoj en tiu renkontiĝo. Inter alie li informis, ke urbo Pleven estas ĝemeliginta kun urbo Rostov sur Dono (USSR), Braila (Rumanio), Pilzen (ĈSSR) kaj Torun (Pollando), kun kiuj Pleven subtenas regulajn kaj fruktdonajn kontaktojn. La afabla dommastro gratulis la partoprenantojn pro la sukceso de la ĵus finiĝinta Revuo de la E-Kanto kaj Parolo, kiun li persone kaj aŭtoritatoj de Pleven konsideras kiel gravan kul-

turan kaj soci-politikan eventon. K-do Vasilev bondeziris al la gastoj sukcesan laboron kun iliaj bulgaraj amikoj kaj samideanoj.

En la nomo de alilandaj gastoj Elizabet Palos dankis al k-do Vasilev pro lia interesa informo kaj pro la afabla gastamo.

Inĝ. Petar Todorov — vicprezidanto de CE de BEA, prezentis la ĉefajn celojn de la renkontiĝo: plimulti la nombron de la ĝemelaj urboj fare de la naciaj E-asocioj, enkonduki Esperanton en kiel eble plej grandan nombron da entreprenoj, fabrikoj kaj institucioj, por ke Esperanto servu kiel lingva ponto inter la geesperantistoj el diversaj landoj. Li ankaŭ proponis, ke ĉiu landa E-asocio difinu konkretan respondeculon, kiu okupiĝu pri la problemoj de la ĝemeliĝo kaj ke ili subtenu regulajn kontaktojn inter si mem.

Nia samideano I. S. Varjuhin el Rostov sur Dono sendis leteron al la konferenco, per kiu li faris kelkajn utilajn instigojn pri la plua kunlaborado de ĝemelaj urboj kaj de la esperantistoj el tiuj urboj.

La partoprenantoj en la kunsido vigle diskutis la starigitajn problemojn kaj faris celkonformajn proponojn: la renkontiĝo estigu regula, tradicia kaj ĉiu aparta renkontiĝo havu sian ĉefan temon, kiu estu pridiskutita. Oni interkonsentis, ke la sekvanta renkontiĝo okazu denove en Pleven.

D. S. R.

GEORGI DIMITROV PRI LA ESPERANTO-MOVADO



Georgi Dimitrov inter laboristoj el Sofio

Cu Dimitrov interesiĝis ĝenerale pri la problemoj de Lingvo Internacia kaj pli konkrete pri Esperanto? Cu li montris intereson al la bulgara Esperanto-movado antaŭ ol li estis devigita forlasi Bulgarijon pro la mort-kondamno de la faŝista tribunalo, ĉar li partoprenis en la gvidado de la Septembra Ribelo en 1923? Al tiuj kaj similaj demandoj oni ne povas doni plenan respondon.

Ekzistas iuj malrektaj donitaĵoj, kiuj kondukas al la penso, ke Georgi Dimitrov informiĝis pri Esperanto jam en sia junaĝo.

En la periodo de lia maturiĝo en la laborista movado la ĉefaj landaj laboristaj pres-organoj — ĵurnalo „Rabotničeski Vestnik“ (Laborista ĵurnalo) kaj revuo „Novo Vreme“ (Nova Tempo) — publikigis plurajn informojn pri diversaj Esperanto-eldonaĵoj (libroj, lernolibroj, vortaroj, propagandiloj). Iuj el la tre proksimaj amikoj kaj aktivaj kunlaborantoj de Georgi Dimitrov sur la sindikata kampo, kiel ekz. Dragoj Kojekov, Kosta Ganev k. a. estis esperantistoj. Kiel redaktoro de la sindikata fako en ĵurnalo „Rabotničeski Vestnik“ en 1912 Georgi Dimitrov donis lokon al informo pri antaŭstarantaj landa kongreso de bulgaraj esperantistoj kaj Universala Esperanto-Kongreso en Krakovo. En 1914 li partoprenis

internacian sindikatan konferencon en Budapeŝto, en kies tagordo troviĝis propono pri akcepto de Esperanto kiel laborlingvo de la Internacia Sindikata Komitato. Post la Unua Mondmilito Georgi Dimitrov estis membro de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj li ne povis ne scii pri la fondiĝo en 1920 de komunista esperantista organizo en Bulgario sub la nomo „Balkana Liberiga Stelo“. Tiel same, li verŝajne konatiĝis kun la enhavo de propaganda broŝuro en bulgara lingvo, eldonita de BLS en 1921.

Georgi Dimitrov alte taksis la vastan aktivadon de multaj diverslandaj esperantistoj, kiuj dum la Lejpciga proceso direktis al li solidarecajn leterojn. Grandan parton de ili la faŝistaj prokuroroj de la Hitlera Termino neniiĝis, sed tamen apartaj leteroj atingis lin en la malliberejo. En la persona arkivo de Georgi Dimitrov nun troviĝas kelkaj el ili. Li gardis ilin ĝis la fino de sia vivo.

Laŭ aserto de la konata germana esperantisto Jürgen Hamann, bibliotekisto en Lejpcigo, inter la libroj de Dimitrov en la muzea biblioteko troviĝas lernolibro de Esperanto por bulgaroj, verkita de Asen Grigorov. Tiu fakto konfirmas la pozitivan rilaton de G. Dimitrov al Esperanto. Ĉiokaze, kiam Asen Grigorov, lia unua persona sekretario en

Bulgario, interparolis kun Dimitrov (konkrete pri materialoj aperintaj en aŭ per Esperanto en eksterlandaj gazetoj, Dimitrov tuj esprimis pozitivan rilaton, ne metante al Grigorov elementajn demandojn rilate Esperanton).

La bulgara esperantisto Asen Grigorov, originala esperanta poeto kaj bonega tradukisto, sperta redaktoro kaj publicisto en esperantaj eldonaĵoj, estis rekomendita kiel persona sekretario al Georgi Dimitrov, tuj kiam ĉi tiu revenis al Bulgario.

Grigorov tre taktike ekparolis Georgon Dimitrov lige kun konkreta materialo aperinta en belga komunista gazeto en franca traduko el Esperanto. Temis pri korespondado de bulgara esperantisto, kiun lia belga korespondanto tradukis por publikigo en francalingva eldonaĵo. Grigorov klarigis al Dimitrov kiamaniere la bulgaraj esperantistoj organizas internacian korespondadon kaj ilustris tion per ekzemploj.

Karakterize estis pri Dimitrov, ke li tre atente aŭskultis siajn kunparolantojn. Li tuj kaptis la pozitivan praktikan signifon de la internaciaj kontaktoj de bulgaraj esperantistoj en periodo tre malfacila por Bulgario, kiam ĝi ankoraŭ estis traktata de la okcidenteŭropaj registaroj kaj de Usono kiel aliancano de Hitler. En la eksterlanda burĝa gazetaro daŭre estis misprezentata la vera situacio en Bulgario. Oni ne nur misprezentis, sed simple kalumniis novan Bulgaron.

Kaj jen: la realisme pensanta ŝtatestro Georgi Dimitrov tuj orientiĝis. Li diris: oni devas uzi ankaŭ tiun kanalon — la esperantan — por disvastigi la veron pri nova Bulgario en la rondojn de la internacia publika opinio. Per Esperanto oni devas varbi novajn amikojn de Bulgario. Post kelka tempo li diris al respondeca persono, kiu gvidis la Presdirekcion ĉe la Ministra Konsilantaro: „La Asocio de Bulgaraj Esperantistoj estas malnova organizaĵo, ekzistanta jam antaŭ la liberigo de la lando el sub faŝista jugo. Tiu asocio havas siajn internaciajn kontaktojn dum multaj jaroj, oni konas ĝin bone en tiuj randoj. Do, kion ĝi, la Asocio, eldonas kaj disvastigas eksterlanden, al tio oni kredos pro la fido, kiun oni havas al la Asocio mem. Facilu tiun agadon de la esperantistoj, malgraŭ ke ekzistas terura manko de papero kaj iuj presejoj estas detruitaj de la bombardado“.

Dank'al lia interveno oni garantiis prespaparon por la eldonado de la revuo de BEA „Internacia Kulturo“, redaktata de Asen Grigorov. Krome, la novefondita Bulgara Esperantista Kooperativo establis sian propran presejon kaj eldonadis broŝurojn, lernolibrojn, originalajn kaj tradukitajn verkojn, multaj el kiuj atingis ankaŭ eksterlandajn esperantistojn.

Tiu grava helpo de Dimitrov, kiu ebligis la eldonadon de „Internacia Kulturo“, havis tre pozitivan sekvon por la internacia Esperanto-movado: la revuo stabiligis tiel, ke ĝi estis transformita en komunan eldonaĵon de balkanlandaj kaj apudnubaj Esperanto-asocioj kun internacia redakta komitato. En la redaktan komitaton eniris ankaŭ la aganta tiam en Zagreb tre aktiva juna profesoro Ivo Lapenna, poste longjara plej respondeca gvidanto de Universala Esperanto-Asocio.

Bedaŭrinde, pri la persona rilato de Dimitrov al la Esperanto-movado ni ne posedas dokumentojn skribitajn de li. La periodo estis tia, ke oni telefone transdonadis ĉe gravajn direktivojn, kaj la koncernaj personoj plenumis ilin, ne strebante al persona sekurigo per havigo de skribaj dokumentoj. Dimitrov malŝatis superflujajn surpaperigojn de taskoj.

Sed dank'al tio, ke Grigorov posedis stenoĝrafion, li diligente notis la indikojn de Dimitrov rilate la taskojn de Bulgara Esperanto-movado. Grigorov estas konata kiel tre precizema kaj honesta persono, ege estimanta Georgon Dimitrov. Grigorov neniel permesus al si alkroĉi al Dimitrov ĉe plej etan penseron favoran al Esperanto, se Dimitrov mem ne eldirus tiun penson. Tial oni povas absolute kredi al Grigorov, des pli ke li publikigis tiujn pensojn en respondeca eldonaĵo de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio.

En la verko „Pri Internacia Lingvo — dum jarcentoj“ aperinta en 1970, troviĝas ellirajo el la stenografiaj notoj de Grigorov pri lia konversacio kun Dimitrov. Dimitrov konsilis: „Agu plue en tiu ĉi direkto. Antaŭ ĉio verku kaj eldonu broŝuron pri nova, demokratia Bulgario, pri la spirito reganta en ĝi, pri niaj atingoj en la rekonstruo ekonomia, kultura kaj socia. Vi estas neŭtrala organizo, viaj rilatoj kun alilandaj esperantistaj organizoj estas tre valoraj, kaj vi devas ilin konforme uzi“.

En tiuj linioj oni tuj rekonas la realisman pensmanieron de Dimitrov. Ne estante mem esperantisto, li sen antaŭjuĝo pritaksis la valoron de la Esperanto-movado kaj senhezite subtenis ĝin.

Ĉe se ekzistus nur tiuj linioj de la eldiro de Dimitrov, ili sufiĉus por ke ni menciu lin inter la plej eminentaj personoj, kiuj amike rilatis al la Esperanto movado kaj al la laboro de la esperantistoj.

El tiuj vortoj de Dimitrov la esperantistoj ĉiulandaj povas ĉerpi stimolon por sia utila kaj nobla agado, apogante sin sur la morala subteno de tiu granda mondfama personeco.

N. ALEKSIEV

Konstantino la filozofo

Sur raspeca pergamen' ekiras ili nudplede kaj
sen ĉapoj —
tridek junsoldatoj ili estas — batalantoj por
sublimaj veroj;
furiozas la imperiestroj, damne krucosignas
sin la papoj,
kaj skribistoj urĝe falsas kaj refaras la antik-
vajn rulpaperojn.

Mi image vidas vin — simila al la suno, vi
sen halt' vojaĝas.
Vi kuŝiĝas en argilkabanoj, levas vin kun
inspiritaj sentoj.
Sub la lina vesto vi trezoron grandan portas,
via kor' kuraĝas.
Via alfabet' miraklo estas ne por tagoj nur,
sed por jarcentoj!

Jen ekzistas ĉiam vi, reale nun ĉeestas via
nom' surtere,
ĉar voj' via elprovita en suferoj grandaj estas
vojo glora
kaj ĝin akompanas klarvidebla spuro de vi
ankaŭ, kiam vere
oni ĉie vin merite nomas filozofo en tag'
via fora.

El la bulgara: SIMANANDA



LA UNUA CELEBRADO

Dum la majaj tagoj en Plovdiv iu metala memortabulo ĉiam estas ornamita per floroj. Sur ĝi staras surskribo: „Tie ĉi, en la iama konstruaĵo de lernejo „Cirilo kaj Metodio“ je la 11-a (24-a) de majo 1857 unuafoje en Bulgario oni honoris la faron de la popolaj klerigantoj Cirilo kaj Metodio.“

En julio 1857 Najden Gerov revenis al Plovdiv kiel vickonsulo de Rusio. Li estis antaŭe instruisto en la sama lernejo. Sendube dank'al lia arda subteno kaj inspiro kreskis la ambicio de plovdivanoj, ke la menciita nur lerneja celebrado akiru socian gravecon, ekludu aktivan popolklerigan rolon inter la loĝantaro de la regiono.

Kaj jen ne pasis multe da tempo, kaj la ĉefinstruisto kaj iniciatinto povis skribi kun plena kontentigo: „Brila celebrado omage al la

memoro de Cirilo kaj Metodio komenciĝis en Plovdiv en 1860, kiam la urbo ekhavis bulgaran preĝejon. Je la 11-a de majo post solena diservo en la templo „Sankta Dipatirino“ la ekleziuloj, akompanate de gelerantoj kaj plenkreskuloj en procesio iris en la lernejon. Tie post akvosanktigo mi faris paroladon kun klarigoj pri la signifo de la festo. Tagmeze elstaraj bulgaroj kun ties familioj kaj gelerantoj vizitis antaŭe elektitan lokon ekster la urbo, kie en agrabla etoso kun kantoj kaj amuzadoj, ili pasigis la ceteran parton de la tago. Tiamaniere oni metis la komencon al la solena celebrado de la festo je la 11-a de majo, kiu de jaro al jaro iĝis komuna ne nur en la plovdiva regiono, sed ankaŭ en tuta Bulgario. De lerneja festo ĝi transformiĝis en tutpopolan festotagon. . .“

KIEL ESTIS KREITA LA HIMNO DE CIRILO KAJ METODIO

La lernantoj en Bulgario sin preparas celebri solene la feston de la slava klerigo kaj kulturo — la Tagon de Cirilo kaj Metodio, la 24-an de majo. Por la festo preparas sin ankaŭ lernantoj de la kvinklasa lernejo en Loveĉ, en kiu instruas la komponisto Panajot Pipkov (1871—1942). En instruho pri kantado en iu kvina klaso, kelkajn tagojn antaŭ la festo, Pipkov ĉesigas sian instrulaboron, rapide desegnas liniarojn sur la nigran tabulon kaj energie plenigas ilin per notoj. Sagaca lernanto alkuras kaj donas novan kreton. Li desegnas pliajn liniarojn. Tamen la instruisto rimarkas nenion — paliginte, li rapidas skribi sur la liniaron la sonantan en li melodion de la himno pri Cirilo kaj Metodio laŭ teksto de Stojan Mihajlovski.

Post ĉirkaŭ duonhoru la instruisto sin turnas al la klaso:

— Legu!

La lernantoj eklegas la vortojn:

„Antaŭen al estonto hela
nun iru, iru, ho naci”...

Kun tremanta voĉo la instruisto Pipkov kantas la melodion. La lernantoj ripetas ĝin post li. Unue timeme kaj necerte, poste — pli kuraĝe kaj pli flue la voĉoj malstreĉiĝas. Ĉiuj ekkant. La lernohoro estas finiĝinta, komenciĝas la interhora paŭzo, kaj ili plu kantas. Antaŭ la pordo de la klasĉambro amasiĝas lernantoj el aliaj klasoj — kun heliĝintaj vizaĝoj ili aŭskultas la nekonatan kanton kaj mem komencas lerni la novan himnon de Cirilo kaj Metodio.

Tiun tagon de 1901 la nova kanto „inundis” la kvinklasan lernejon en Loveĉ kaj elflugis el ties klasĉambroj por trovi lokon en ĉiuj bulgaraj koroj, por resti en ili eterne.

Jonko KORKINOV

DUA KOOPERATIVA RENKONTIGO

Je la 11-a de aprilo 1982 en urbo Ruse okazis la Dua Renkontigo de Esperantistoj-Kooperativanoj. Ĝi realiĝis dank'al la starigitaj solidaj kontaktoj inter la Distrikta Kooperativa Esperantista Grupo kaj la Distrikta Kooperativa Unuiĝo en tiu ĉednuba centro.

Sub la inspirita slogano „Esperanto — en la kooperativojn” en la salono de la Distrikta Kooperativa Unuiĝo kolektigis pli ol 50 personoj, por pridiskuti la raporton „La Rolo de Esperanto en la Kooperativa agado kaj la taskoj, starantaj antaŭ la kooperativanoj-esperantistoj lige kun la decidoj de la IX-a Kongreso de la Centra Kooperativa Unuiĝo (CKU)” — prezentita de Dimitar Mutuŝev — sekretario de la Kooperativa Esperantista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio (BEA).

Ĉiuj partoprenantoj interkonsentis, ke la atingitaj sukcesoj, la realigitaj pozitivaj rezultoj fare de la bulgara kooperativa movado meritas esti popularigitaj de la kooperativanoj-esperantistoj, kiuj havas ankaŭ specialan mision: per Esperanto informi siajn amikojn kaj korespondantojn pri la atingitaj sukcesoj aŭ sendi materialojn por la esperantlingvaj eldonoj. Meritas esti diskonigitaj ankaŭ ĉiuj iniciatoj, la pozitivaj spertoj en la komerco, la elaceto, la servoj, la produktado de pli multaj kaj variaj varoj por vasta konsumado, en la sfero de la publika nutrado k. a.

Speciala atento estis dediĉita al la internaciaj kontaktoj inter la kooperativaj unuiĝoj

kaj kooperativoj kaj la utiligado de Esperanto por aliĝo de vasta rondo da partoprenantoj en ili, al la organiza fortikigo de la distriktaj kooperativaj esperantistaj grupoj kaj la organizado de kursoj por lernado de Esperanto fare de kooperativanoj, al la batalo por paco k. a.

Aprobita estas la komuna iniciato de la Kooperativa Esperantista Sekcio ĉe BEA kaj la Kooperativa Esperantista Komisiono ĉe la Hungara Esperantista Asocio por unuiĝo de la klopodoj de la kooperativanoj el la tuta mondo kaj komenciĝo de organizita kaj celdirektita agado por disvastigo de Esperanto en la internacia aktiveco de la kooperativaj unuiĝoj, organizoj kaj kooperativoj.

Entuziasme estis akceptita la iniciato pri la fondo de Tutmonda Kooperativa Esperantista Ligo, kiu unuiĝu en komunan gvidadon kaj direktu la procezojn mondscale. Per la deklaro estas invitataj la kooperativanoj-esperantistoj labori aktive por altiro de novaj membroj en la Bulgaran Esperantistan Kooperativon, por ke ĝi disvolviĝu plu kiel stabila ekonomia organizo de la bulgaraj esperantistoj; esprimi en sia korespondado objektive kaj ĝuste la konkeritajn atingojn en la diversaj sferoj de la kooperativa sektoro; klarigi ĉiuloke la konsekvencajn kaj ĝustan politikon de la Bulgara Komunista Partio por plua disvolviĝo kaj prospero de la kooperativoj en nia lando.

D. ATANASOV

LA E-INSTRUADO — PROBLEMOJ, ESPEROJ...



Pasis jam preskaŭ unu lernojaro depost la enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la bulgaraj mezlernejoj. Tial venis tempo por raportoj objektivaj pri la atingoj kaj mankoj, jam nun noti la urgajn taskojn, por ke venontjare dekoj da gejunuloj en la ĉefurbo ekl arolu la Internacian Lingvon.

Dum la lernojaro 1981/1982 Esperanto estis instruata en du sofiaj mezlernejoj: 18-a Unueca Politeknika Mezlernejo (ESPU) „Cirilo kaj Metodjo“ kaj Modela Teknikumo pri Fajna Mekaniko kaj Optiko (OTFMO) „M. V. Lomonosov“. La konversacio kun la kursgvidantoj alkondukis al jenaj veroj, kiujn ni nomus

PROBLEMOJ DE LA EKSTERA LEKTORO

BISTRA DOJČINOVA :

„La malicilaĵoj en 18-a ESPU komenciĝis unufoje pro tio, ke mi ne estas regula instruistino en la gimnazio. Ĉiu instruisto havas sian kabineton, kiun oni ŝlosas post finiĝo de la lernohoroj. Do, mi ĉiujfoje perdis tempon por serĉi liberan ĉambron.

La E-lektoro estas en malpli avantaĝa pozicio ol ties kolegoj — la instruistoj de fremdaj lingvoj en

la mezlernejo. Mankas vidmaterialoj, diapozitivaj, projekciiloj k. a. La E-instruisto sentas moralan devon, ke ties lernantoj eklernu serioze Esperanton. La penetro de la Internacia Lingvo en la mezlernejojn estas grava atingo por disvastigo de Esperanto inter la junularo. Miaj gekursantoj estas precipe konsciaj gelnantoj, kio aparte faciligas mian laboron.

Mi opinias, ke ĉiam ankoraŭ nesufiĉa kaj malefika estas nia propaganda laboro. Mi estas adepto de propaganda formo laŭ mi sufiĉe rezultodona — temas pri ekspozicioj en ŝlositaj montrolenestoj. Riĉe ilustritaj tabuloj kun konvenaj tekstoj bulgare kaj esperante estu instalitaj sur „strategiaj“, multe vizitataj lokoj, kie ĉiutage pasas multaj homoj — ekz. en la centra stacidomo, en la substrataj pasejoj en la centro de Sofio k. a.“

DIMITAR DENČEV:

„Mankis fiksita klastambio por la E-lecionoj en la teknikumo „M. V. Lomonosov“. En la komenco la kurslano suferis pro nedifinitaj horoj kaj tagoj en la semajna instruplano por okazigo de la E-kurso. Ĉiun fojon mi interkonsentis kun la gelnantoj pri la paco kaj horoj de la sekva leciono. La E-kurso konsistis el gekursantoj el du unuaj mezlernejaj kursoj kun diversaj instruprogramoj, kio evidente malhelpis la instruadon de Esperanto. Krome studrondoj kaj aliaj eksterklasaj aktivecoj „okupis“ ilian nesufiĉan liberan tempon.

La E-instruado komenciĝis meze de oktobro kaj... finiĝis komence de februaro — la grupo disfalas... Laŭ mia opinio la informoj kaj varban agado por la lernado de la Internacia Lingvo devas prizorgi du instancoj: la Urba Estraro de BEA kaj la koncerna mezlernejo.“

Antaŭ ol komenti la eldirojn de ambaŭ kursgvidantoj kaj tiri iujn konkludojn, ni prezentu

LA OPINION DE KURSANTINOJ

Tiucele ni improviziis enketon, starigante jenajn demandojn:

- Kiam vi unufoje aŭdis pri Esperanto?
- Kiel vi reagis al la decido de la Ministerio de Popola Klerigo rilate la fakultativan E-instruadon en la mezlernejoj?
- Kial vi enskribiĝis por lerni la lingvon?
- Kiel vi ekposedas la lernomaterialon en Esperanto kompare kun la aliaj fremdaj lingvoj?
- Kion vi postulus de la junulara sekcio ĉe BEA por ligi la Internacian Lingvon kun agrablaj kaj utilaj okupoj?
- Kia estas la opinio de viaj geamikoj kaj parencoj pri Esperanto kaj kiamaniere vi propagandas ĝin inter ili?

STEFKA STANOVA — 18-A ESPU «CIRILO KAJ METODJO»:

De mia amikino mi unufoje aŭdis la vorton „Esperanto“. Ŝia patro lernis la lingvon antaŭ jaroj kaj ŝi eksciis de li kelkajn vortojn, kiujn mi ankaŭ ellernis. La Internacian Lingvon mi eklernis, ĉar mi havas emon al fremdaj lingvoj.

Unu tagon kunvenis ĉiuj naŭaj klasoj, venis esperantistoj kaj komunikis la ministerian decidon pri la enkonduko de fakultativa E-instruado en la mezlernejojn. Verve parolis la ĝenerala sekretario de CE de BEA Kunĉo Valev. Mi unufoje aŭdis E-paroladon — impresis min la belsoneco de la lingvo, ties melodieco kaj proksimeco al la franca lingvo.

La Internacia Lingvo tamen estas multe pli facila. Per ĝi homoj el diversaj naciecoj povas interkompreniĝi sen posedi aliajn fremdajn lingvojn. Kiam mi bone ekposedos ĝin, mi povos legi revuon „Bulgara Esperantisto“ kaj eksterlandajn E-periodaĵojn. Krome mi intencas konatiĝi kun la traduka kaj originala E-beleto. Mi opinias, ke la lingvo devas esti instruata en ĉiuj sofiaj mezlernejoj, kaj ne nur iuj havu tiun privilegion.

Mi speciale ĝojus ĉeesti E-vesperojn je alta profesia kaj lingva nivelo. La diskotekoj estas popularaj kaj ŝatataj de la junaj homoj arangoj. Imagu kian grandan propagandan efikon havus diskoteko, gvidata en Esperanto.

KAPKA MILADINOVA — 18-A ESPU «CIRILO KAJ METODIO»:

„Mi lernas la anglan lingvon kaj ne trovas komencajn naciajn inter ĝi kaj Esperanto. Tamen la Internacia Lingvon oni lernas facile kaj agrable. En mia medio oni opinias, ke estas interese scii la lingvon, sed ne estas sufiĉe konvinkitaj pri tio.

Mi estas filatelisto kaj intencas per korespondado en Esperanto interŝanĝi poŝtmarkojn.“

NEVENA DIMITROVA — 18-A ESPU «CIRILO KAJ METODIO»:

„Mi opinias, ke la propagando de Esperanto estas nesufiĉa. En multaj mezlernejoj oni entute ne scias pri la ekzisto de tiu lingvo, pri ties fakultativa instruado. Kial la esperantistoj ne utiligas la grandan efikon de la amaskomunikiloj, precipe de la televido? Kial la bulgara televido ne organizu E-kurson? Mi volonte spektus filmon en Esperanto, kun ĝojo aliĝus al la klubo „Juna Esperantisto“ kaj okupiĝus pri organiza laboro, se oni proponus al mi.

ELENA SIMEONOVA — 18-A ESPU «CIRILO KAJ METODIO»:

„Per Esperanto mi povas korespondi kun ĝeĵunuloj el la tuta mondo, kaj ankaŭ veturi kaj ekoni fremdajn landojn kaj popolojn. Partoprenante en E-arangoj, oni tre rapide aliĝas al la bulgara E-movado.

Oni ne profitas la grandajn propagandefikojn de la amaskomunikiloj por propagandi la lingvon.“

MARIANA HRISTOVA — OTFMO „M. V. LOMONO-SOV“:

„Esperanto kaŭzis bruon en nia teknikumo, mi dirus, ĝi tuj aktualigis. El mia kurso multaj enskribiĝis por lerni la lingvon. Mi ankaŭ aliĝis al la E-kurso — pro scivolemo, kaj poste ekinteresiĝis. Tamen poste mi rezignis pri la E-lecionoj, ĉar nia lernoprogramo estas tro ŝarĝita. Venontjare mi faros ĉion eblan por lerni la Internacian Lingvon ĉu en E-kurso en nia mezlernejo ĉu aliloke.“

Multaj respondoj similis unu la alian kaj por ne ripeti, mi konscie ne publikigis iujn el ili. Ni klopodis elekti karakterizajn eldirojn, por ke ni „kaptu“ la respondojn al la demando, kiu emocias nin: kiel plibonigi nian propagandan, organizan kaj instru-laboron por atingi venontjare pli bonajn rezultojn.

KONKLUDOJN

donas la eldirojn mem de la lernantinoj.

La unua problemoj estas: Kiel altiri amase mezlernejanon al la E-kursoj? Kiel klarigi la fakton, ke en 18-a ESPU el 170 nauaklasanoj nur... 16 gelnantoj ekdeziris partopreni en E-kurso. Multaj ĝeĵunuloj tute ne aŭdis pri Esperanto. Oni ne utiligas la grandajn informeblecojn de la amaskomunikiloj. La varbaj prelegoj en la mezlernejoj estas necesa kaj efika propagandformo. Ni bezonas vastan

E-propagandon grandskale. Jam informitaj pri la lingvo, la gelnantoj devas ekhavi bonan imagon pri ĝi.

Ni supozu, ke la mezlernejoj jam estas varbitaj por Esperanto, tiam trudigas la dua problemoj: kiel reteni ilin en niaj E-vicoj. Kiajn interesajn okupojn ni proponu al ili? Ni ne forgesu la somerajn feriojn. Al la gelnantoj, lernintaj ĉi-jare Esperanton, oni devas proponi interesajn formojn por praktikado de la lingvo. Kiel? En kiuj arangoj? Ni atendas la parolon de BEA kaj ties junulara sekcio.

La tria problemoj — tre grava por tiu ĉi momento — estas la manko de bone kvalifikitaj instruistaj kadroj ne nur en Sofio. Ni jam konas la embarasojn de la eksterlerneja E-lektoro, kiujn oni povus eviti, se ĉiu mezlernejo havus etatan instruiston de Esperanto. La avantaĝoj estas evidentaj.

Kaj nun ni disponigu la parolon al Nikola Tončev — vicdirektoro pri la instrulaboro en OTFMO „M. V. Lomonosov“, kiu validas por la organizantoj de mezlernejaj E-kursoj en la tuta lando: „Kompreninte, ke en la teknikumo estos instruata Esperanto, la gelnantoj tuj entuziasmiĝis. El du kursoj 30 personoj enskribiĝis por lerni la Internacian Lingvon kaj ili venis al la unua leciono. Tamen la instruisto mankis. La sekvan fojon li denove forestis. Li venis al la tria leciono, sed jam estis malfrue. Interleme formiĝis studrondoj kaj alispecaj formoj de eksterlernejaj aktivecoj. La mezlernejoj aliĝis al ili. Mi opinias, ke se venontjare la aferoj estos organizitaj pli bone kaj ĝustatempe, parto de la lernintoj denove enskribiĝos en E-kurso.“

Do, ĝis la 15-a de junio la organizantoj de E-kursoj devas sciigi nin en skriba formo, ke en la venonta lernoĵaro en nia mezlernejo estos instruata fakultative Esperanto. Oni menciui la nomojn de la E-lektoroj, ties klercon kaj rajton instrui la Internacian Lingvon. Tio necesas, por ke ni preparu dokumenton pri enoficigo kaj antaŭvidu la koncernan honorarion. Ni devas renkontiĝi kun la instruisto komence de la lernoĵaro por fiksi la horojn de E-instruado kaj la klasĉambron. Sen tiu anticipa organiza laboro ni ne povus ĝui bonajn rezultojn.“

Ni priskribis kiel statas la aferoj lige kun la fakultativa instruado de Esperanto en la sofiaj mezlernejoj. Surbaze de la kolektitaj informoj ni klopodis fari iujn konkludojn. Ni esperas, ke ilin profitos ankaŭ provincaj agantoj de BEA. En la sekvaj numeroj ni traktos plu la tusan demandon, ĉar ĝi estas tre grava kaj aktuala por la bulgara E-movado. Ĉar la estonteco apartenas al la junaj fortoj. De ili dependas ankaŭ la disvastigo kaj popularigo de la Internacia Lingvo.

Maria JANKOVA

OMAĜE AL GEORGI DIMITROV

SOFIO.

Estis malfermita ekspozicio „La Lejpeca proceso en la politika grafiko kaj karikaturo“, aranĝita laŭ iniciato de la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Sofio kaj de la Kultur-Informa Centro de GDR en Bulgario. Ĝi estas unua manifestado de la Centro, dediĉita al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov.

Estis prezentitaj grafikoj de pentristoj-kontraŭfaŝistoj el la tuta mondo. Inter ili — Boris Efimov, V. Fedorovski (USSR), G. Heartfield (Germanio) kaj multaj aliaj. La pliparto de la verkoj estas publikigitaj en presorganoj kiel „Pravda“, „Izvestija“, „L'Humanité“, „Manchester Guardian“, ka.

Bone prezentita estas ankaŭ la bulgara politika ilustraĵo — per verkoj de la konataj majstroj de la grafikarto Ilija Beŝkov, Aleksandr Jendov kaj Boris Angeluŝev, aperintaj sur la paĝoj de la gazetoj „Jupel“, „Vik“ kaj „Antifaŝistki Front“.

N. Kretev

SMOLJAN

Antaŭ ol partopreni la Nacian E-feston en Pleven, la esperantistoj el la E-societoj en la distrikto de Smoljan por la unua fojo ĉi-jare organizis Distriktan revuon de E-kanto kaj parolo. Tiu ĉi aranĝo estis inaŭgurita de Jordan Jordanov — prezidanto de DE de BEA.

Plej amase sin prezentis la esperantistoj el Ĉepelare, Zlatograd kaj Madan. Evidentiĝis la obstina preparo kaj deziro de ĉiu partoprenanto prezenti sin bone.

Per sia interesa recitalo „Nia Dimitrov“ la grupo el Smoljan bonege sin prezentis antaŭ la kompetenta jurio. Bona estis ankaŭ la interpreto de popolaj kantoj el Rodopi-montaro, plenumitaj de Balina Kasamska el la sama urbo. Ĥristina Darmoneva kaj Zaharinka Mutafčieva el Ĉepelare plenumis „Hej, pole ŝiroko“ („Ho, kamparo vastal“). Per originalaj versoj sin prezentis Diĉo Gambazov kaj Maja Dimitrova el Zlatograd. Ivan Jončev el Rudozem recitis versojn, dediĉitajn al Georgi Dimitrov kaj montris profundan poezian senton. Tiuj plej bonaj plenumoj de la distrikta E-revuo estis konvene premiitaj.

M. Dičeva

ŜUMEN

Esperanto-societoj „Vekigo“, „Sano“ kaj „Progreso“, P.K. 60, 9700—Ŝumen, Bulgario, aranĝos en junio 1982 solenajn okazo de la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. Ni petas ĉiujn, kiuj estimas lian agadon kaj niajn landon kaj popolon, sendi al ni salutleterojn, rememorojn kaj ĉiuspecajn materialojn pri li el la landa gazetaro ktp.

Ĉiu kontribuinto ricevos respondon.

Cv. Todvorov

GABROVO

En la lasta semajno de marto 1982 en la Urba Kulturdomo en Gabrovo E-societo „Verda Torĉo“ aranĝis ekspozicion dediĉitan al la 100-jariĝo de Georgi Dimitrov. Estis prezentita originala kaj traduka E-literaturo, bulgaraj kaj eksterlandaj E-revuo, pupoj en naciaj kostumoj el la riĉa kolekto de la esperantistino Elena Kovacheva.

Preskaŭ 780 personoj vidis la ekspozicion. Krom gelernantoj kaj civitanoj el Gabrovo ĝin vizitis ankaŭ esperantistoj el Gabrovo-distrikto kaj el Veliko Tirnovo kaj turistoj el Moskvo. Multaj el la vizitantoj enskribis siajn impresojn en la impreslibro de la societo. Estis esprimita komuna opinio, ke Esperanto estas fenestro al la tuta mondo, vera internacia lingvo.

En sia jarkunveno la membroj de E-societo „Verda Torĉo“ decidis aktive agi por plimultigo de la societa membraro dum 1982 kaj okazigi alt-nivele E-renkonton dum la Dekado de la humuro kaj la satiro, starigi kontaktojn kun Komsomolo, profesiaj unuiĝoj kaj kun E-societoj en la ĝemelaj kun Gabrovo urboj en Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Sovetunio.

Sonja Tiĥova

E-KANTGRUPO EN ĈEPELARE



La esperantistoj el E-societo „Diĉo Petrov“ en Ĉepelare fondis grupon pri E-parolo kaj kanto. Inter la plej bonaj interpretantoj estas: Toni Stoičkova, Nadka Daskalova, Valka Sirakova, Silvana Jordanova, Nikolina Takova, Zaharinka Mutafčieva kaj Ĥristina Darmoneva. Per siaj interpretoj ili aktive kontribuas por popularigo de la Internacia Lingvo.

D. Ĉernev

HONORE AL E-VETERANO

Antaŭ ne longe la esperantistoj en Sumen solene honoris la 80-jarigon de la atestimata membro de la urba E-societo „Vekiĝo” Vasil Ostrev.

Longa kaj malfacila estis la vivo de la veterano. Li naskiĝis je la 25-a de februaro 1902 en malriĉa laborista familio kaj jam kiel infano restis sen patro. Peza estis la vivo de la kvarmembra familio, sed Vasil Ostrev sukcese finliris gimnazion kaj instruistaron instituton. Kiel lernanto li partoprenis en marksista studrondo, gvidata de Bojan Balgaranov. Li estis instruisto en la vilaĝoj de Sumen-distrikto. Je la 9-a de septembro 1944 li estas direktoro de Dua Baza Lernejo en Sumen.

En 1962, jam 60-jara, Vasil Ostrev eklernis intense Esperanton kaj aktive ekagis en E-societo „Vekiĝo”.

La CE de BEA distingis la jubileon per honora insigno pro lia 20-jara senlaca E-agado. Veska Dragostinova — prezidanto de DE de BEA, elkore gratulis la veteranon kaj bondeziris la li pluan aktivadon.

Vasil Gradinarov

PRINTEMPA RENKONTIĜO

Fine de marto j. k. junpioniroj el la E-kurso en Drjanovo kaj junpioniroj el la fakultativa E-klaso el lernejo „T. Karpinskaja” — Gabrovo renkontiĝis en la historia loko Drjanovo-monaĥejo. Ĉeestis estraranoj de la E-societoj el la du urboj.

Ili vizitis la muzeon en la monaĥejo kaj aŭskultis interesan paroladon pri ĝia historio, pri la kruela 9-taga batalo en la monaĥejo dum la Aprila Ribelo kaj pri la heroaĵo de Baĉo Kiro — ribelulo kaj popola instruisto. En la monumento-ostejo la pioniroj kliniĝis antaŭ la memoro de la pereintaj ribeluloj.

Poste la infanoj vizitis la kavernon „Baĉo Kiro”, proksime de la monaĥejo. Ĉi tie iam loĝis kavernbestoj kaj kavernhomoj.

En agrabla amika etoso la junpioniroj kantis kaj deklamis en Esperanto.

Sonja Tiĥova
Elisaveta Karaivanova

LITERATURA VESPERO

En marto k. j. en la Centra Domo de la Instruisto okazis literatura vespero, dediĉita al la verkaro de nia bone konata poetino Penka Batoeva — multjara aktivulino de la Instruista E-societo „Diĉo Petrov” en Sofio. Ŝi estas membro de la literatura rondo, gvidata de la elstara E-poeto kaj publicisto Asen Grigorov. La vesperon partoprenis pli ol 20 personoj. Inter ili estis la prezidanto de CE de BEA — Ĥristo Gorov kaj Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM.

La ĝenerala sekretario de CE de BEA — Kunĉo Valev, per korvarmaj vortoj salutis la poetinon kaj alte pritaksis ŝian verkaron.

La aktorino Vera Vajarova plenumis mallongan recitalon laŭ versoj de Penka Batoeva.

Lidia Ambrojeviĉ

LA E-POŝTMARKO EN BULGARIO



La unua bulgara poŝtmarko pri esperanta temo estas emisiita la 16-an de junio 1947, okaze de la 30-a Nacia Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj. Ĝi prezentas verdan stelon sur konturita mapo de Bulgario. Nominala valoro — 20+10 levoj, eldonkvanto — 316 000 ekzempleroj. Aŭtoro de la projekto estas la pentristo Borov.

La 15-an de aŭgusto 1957, okaze de la 50-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA) kaj de la 70-jara jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto estis emisiita poŝtmarko. Nominala valoro — 44 stotinkoj. Eldonkvanto — 220 000 ekzempleroj. Aŭtoroj — la pentristoj Metodi Veleŭ kaj Stefan Kanĉev.

En 1959 la bulgara poŝta administracio emisiis novan E-poŝtmarkon okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. Nominala valoro — 1.25 levoj; eldonkvanto — 100 000 ekzempleroj. Aŭtoro de la projekto estas la popola pentristo Boris Angeluŝev.

La 14-an de julio 1962, okaze de la 35-a nacia kongreso de la bulgaraj esperantistoj sur la jubilea marko de Zamenhof estis farita surpriso „XXXV Kongreso 1962”. La nova valoro de la marko — 13 stotinkoj — estis stampita per ruĝa koloro.

Lige kun la 48-a Internacia Kongreso de Esperanto, okazinta en Sofio en julio 1963, estis emisiita multkolora poŝtmarko. Ĝia valoro estis 13 stotinkoj kaj la eldonkvanto — 300 000 ekzempleroj, projekto de popola pentristo Stefan Kanĉev.

La lasta poŝtmarko pri temo Esperanto estis eldonita en 1978 okaze de la 63-a Internacia Kongreso de Esperanto en Varna, Bulgario. Ĝi havas nominalan valoron de 13 stotinkoj kaj eldonkvanton de 120 000 ekzempleroj. Ĝia aŭtoro estas la pentristo Todor Momĉilov.

Draguŝko Simeonov

KIEL NI ALTIGU LA NIVELON DE NIA LINGVOSCIO?

(Daŭrigo de n-ro 4/1982)

Por plibonigi nian scion, ni devas ekzerci nin. Kvaronhoro da ekzercado ĉiutage pli bone efikas, ol horo kaj tri kvaronoj ĉiun mardon. Mi konsilas al ĉiu komencanto kaj progresinto: studu Esperanton ĉiutage!

Ĉiu povas pripensi tri grandajn rimedojn por plibonigi sian scion:

1. Legu. 2. Skribu. 3. Parolu.
- Post multjaraj spertoj mi aldonas:
4. Kontrolu. 5. Servu.

1. Legu

Ia ajn legado pli helpas ol nenia legado. Se vi legas nur facilajn, malpezajn verkojn, vi pli kaj pli al kutimiĝas al la vortoj kaj kutimoj de la lingvo; via legado rapidiĝas; vi komencas iom pensi en Esperanto. Se, kiam ni legas, ni serĉas en vortaro ĉiun vorton, kiun ni ne konas, ni pligrandigas nian vortostokon. Estas bone havi notlibron por novaj scioj.

Estas grave, ke esperantistoj laŭeble aĉetu bonajn esperantajn librojn. Sed estas aliaj rimedoj por legemuloj. Ĉiu loka grupo devus havi grupan bibliotekon. Kaj en multaj landoj, publikaj bibliotekoj akiros stokon de esperantaj libroj, se sufiĉaj homoj montras intereson.

Kelkaj legaj ekzercoj estas aparte valoraj:

a) Legu tradukon de verko, kaj komparu ĝin kun la originalo; rigardu la esprimrimedojn, la problemojn kaj solvojn.

b) Laŭtleĝu en grupo; ĉar por laŭtleĝi, oni devas ne nur vidi, sed vere rigardi; oni samtempe ekzercas sin pri elparolo kaj parolado.

c) Legu, kaj notu pri via legado, ekzemple, resumu, en Esperanto, la enhavon de iu libro.

d) Ne forgesu legi la verkojn de Zamenhof, niajn modelojn, kaj ankaŭ ion aktualan, kie ordinaj nuntempuloj esploras nuntempan stilon kaj vortaron. Mi aparte rekomendas la tre interesan gazeton „Monato“. Ni pli ofte bezonas vortojn kiel televidilo, atombombo, komputero, antibiotiko, kserografio, kaj ekstereŭropajn vortojn kiel ingvano, tatamo, gnuo, manioko, kiujn Zamenhof ne uzis, ol kelkajn vortojn, kiujn li elpensis, ĉar tiutempe li bezonis ilin, kiel vojevodo, jesaulo, vokto, pudo; ni tenu unu piedon en la historio, la alian en la nuntempa mondo.

e) Kaj ofte ni turnu nin de romanoj kaj antologioj, gazetoj kaj dramoj, por relegi nian gramatikon aŭ pli bone esplori nian vortaron. Mi mem povas diri, ke nuntempe la legado, kiu plej konstante helpas min plibonigi mian lingvoscion, estas mia konsultado en la Plena

Ilustrita Vortaro. Ĝi estas trezorejo ne nur de vortoj, sed de precedencoj kaj esprimrimedoj.

2. Skribu

Faru ekzercojn — el iu lernolibro, en ia kurso. Faru traduketojn. Mi aparte rekomendas „Paŝoj al Plena Posedo“, de William Auld, por vere pensigaj ekzercoj. Skribu leterojn al plumamikoj, precipe al amikoj, kiuj ne sciopovas vian nacian lingvon, tiel ke vi ne povos helpi vin per krokodilado. Ĉiam, skribante, restu kiel eble plej konscia pri la ricevonto. Jes, vi komprenas vian leteron, sed ĉu Kuame en Afriko aŭ Atuk en Gronlando komprenos ĝin? — jen la demando!

3. Parolu

Ni neniam lernos paroli Esperanton flue, sole kaj en silento. Se eble, ni partoprenu ian grupan vivon. Kaj estas grave, ke en ĉiu Esperanto-klubo, en ĉiu eta grupo, la anoj parolu Esperanton inter si dum granda parto de la tempo. Ni parolu nacilingve tie, nur por certigi, ke veraj komencantoj aŭdis ian gravan informon, ekz. pri la venonta kunveno; aŭ por klarigi ion pri Esperanto, ekzemple iu problemo gramatika, kiu perpleksigas iun.

Se tute ne estas eble partopreni la vivon de la grupo, parolu al vi mem, instru familiojn, insultu la katon esperante, korespondu per sonbendoj, konversaciuj telefone. . .

Se eble, iru ien, kie vi devos paroli esperante; Universala Kongreso estas ideala, sed iu ajn renkontiĝo kun alilandanoj estas valora. Se vi mem ne povas vojaĝi, eble vi povas inviti iun viziti vin?

Ofte estas bone, en grupo, havi ian difinitan ekzercon, kiun ĉiuj antaŭpreparas. (Ekzemple, ĉiu alportu interesan objekton kaj klarigu pri ĝi). Ni ankaŭ ne forgesu, ke tre necesa parto de konversacio estas aŭskultado; ni lernas ion, ne nur kiam ni parolas, sed kiam ni atente aŭskultas kaj kutimiĝas niajn orelojn al la lingvo. Kaj ni ne forgesu, ke tiu, kiu persiste parolas nacilingve en esperantista rondo, ne nur malhelpas sian propran lernadon — sed malhelpas ĉiujn aliajn.

4. Kontrolu

Sen kontrolado, abunda ekzercado povas foje nur firme enradikigi erarojn en niajn mensojn! Ni ofte ne scias, kion ni ne scias. Antaŭ nelonge, mi komencis skribi pri la floro „iriso“ sed kontrolis en PIV — feliĉe! La floro estas irido; iriso estas ja esperanta

vorto, sed nomas parton de la okulo.

Mi estas sperta verkistino, akademiano, kiu jam aperigis 11 librojn en Esperanto. Mi ĵus finverkis legolibron, ĉirkaŭ 100 000-vortan. Sentante la specialan devon ne instrui erarojn al lernantoj, mi kontrolis en PIV la precizan signifon kaj ĝustan uzadon de ĉirkaŭ ĉiu dudeka, foje ĉiu deka vorto; do almenaŭ 5 000 vortoj. Kaj tiel mi, kiu iam scipovas Esperanton, tamen savis min kaj miajn legantojn de eble 300 eraretoj. Do, ni ĉiuj multe kontrolu en vortaroj, se eble en PIV, se ne eble, almenaŭ en la tre bona Plena Vortaro (kun Suplemento), en nacilingvaj vortaroj, kaj foje en libroj pri gramatiko. Granda parto de progreso en iu ajn fako estas ia malvido al nia propra scio, ia preteco ankoraŭ lerni

5. Servu

Estas konata paradokso en homaj rilatoj, ke ni ofte plej amas tiujn, al kiuj ni bonfaras — pli ol tiujn, kiuj bonfaras al ni. Ni pli bone ellernas nian lingvon, kiam ni servas ĝin; laborante por ĝi, ni trovas ĉiam freŝajn motivojn por pli kaj pli esplori ĝin. Talentoj varias: unu instruu, alia propagandu, unu organizu grupan bibliotekon, alia traduku; sed ĉiu povas trovi ian personan kapablon fari ion utilan, kaj la neceso uzi la lingvon por praktikaj celoj aŭ defendi ĝin, kaj klarigi pri ĝi, devigas nin ellerni ĝin.

Oni ofte miskomprenas la tute veran aserton, ke „Esperanto estas facila“. Ĝi ne estas absolute facila, kiel estas la lekado de glaciaĵo. Ĝi estas facila kompare kun nacia lingvoj. Esperanto estas miraklo de facileco

logiko, fleksebleco, konsekvenco, libereco; ĝi levas facilecon al la nivelo de ia estetika kvalito, ia unika beleco. Sed ni neniam forgesu, ke tamen ni devas vere lerni ĝin: ĝi ne estas ia limigita kodo de kelkaj utilaj frazoj, sed plene vivanta moderna lingvo; ĝi estas tre valora, por ne postuli ian penadon. Sed, dum en multaj lingvoj parkerigendaj konjugacioj kaj miloj da anomalioj nenecesaj tedas nin, en Esperanto ĉio lernenda estas io lerninda, kiu pliriĝas nian esprimkapablon.

Antaŭ nelonge, bona gazeto, kiu konsideris min kiel estontan kontribuanton, sendis al mi enketilon, sur kiu staris jena demando: mi devis indiki la nivelon de mia lingvoscio per kruceto ĉe unu el tri vortoj:

„mi regas Esperanton lege kaj skribe
perfekte
bone
mezbone“

Mi post hezito aldonis — ge al bone, markis ĝin per kruco, kaj skribis apude:

„Neniu rajtas diri, perfekte!“

Sed tiu ĉi diro ankaŭ signifas, ke neniu devas stagni; ni ĉiuj povas progresi senfine. Se ni ne penas por progresi, ni baldaŭ malprogresas. Ĉiu el ni povas elekti: ĉu esti esperantisto aŭ nur ekesperantiginto; ĉu paroli Esperanton aŭ Esperaranton; ĉu konstante krei por aliaj tedojn, aŭ konstante krei por si mem etajn triumfojn.

MARJORIE BOULTON

(el l'Esperanto, n-ro 6/1981, resuma versio de la prelego en la FEL-Kongreso, 1980, kun certaj mallongigoj)



DEZIRAS
KORESPONDI

BULGARIO

Esperantistoj-medicinistoj el Preslav — kun ĉi pri ĉi, precipe pri medicino: Ginka Stančeva (28-jara flegistino) — 9850 Preslav, str. „Cerkovski“ 40; Donka Marinova (38-jara flegistino) — 9850, str. „Cerkovski“ 43; Jordanka Ilinčeva (46-jara reŝena laborantino) — 9850 Preslav, str. „Karavelov“ 16; D-ro Dimitar Slavov (40-jara neŭrologo) — 9850 Preslav, str. „Boris Spirov“ 27; Slavka Atanasova (30-jara flegistino) — 9850 Preslav, str. „Boris Spirov“ 63, v.h. 4, ap. 10; Donka Polihronova (30-jara flegistino) — 9850 Preslav, str. „K. Metodij“ 25; D-rino Eli Salabaševa (28-jara akuŝkuracistino) — 9850 Preslav, str. „Javorov“ 10; D-ro Eskul Palov (27-jara kuracisto) — 9850 Preslav, str. „Vasil Levski“ 2; Jivka Mineva (27-jara flegistino) — 9850 Preslav, str. „Ivan Matev“ 8; D-ro Hamdi Rafiev (kuracisto) — 9850 Preslav, str. „Rakovska“ 7A. Cvetan Gergov (46-jara inĝeniero), 1404 Sofio, str. „Vasil Dimitrov“, bl. 244 v.h. E, ap. 77 — der. kor. kun ĉi pri ĉi; interŝ. 1P, gramofondiskojn, kasedojn. Satokupoj — vojaĝado, radioamatoreco kaj elektroniko.

E-kursanoj el Miĥajlovgrad — kun ĉi pri ĉi: Tanja Dojčeva (26-jara kompostistino) — 3400 Miĥajlovgrad, bul. „G. Dimitrov“ 124; Jurij Ljubenov (21-jara oficisto) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Stambolij-ski“ 84; Marieta Krasimova (19-jara oficistino) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „22 septemvri“ 7; Krasimir Ivanov (27-jara oficisto) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Stefan Karaĝa“ 8, bl. „Rila“, v.h. 2, ap. 10; Joro Koev (25-jara oficisto), 3400 Miĥajlovgrad, str. „Morava“ 7 — kun esperantistoj el Bukureŝto, Budapeŝto, Prago kaj Varsovio; Nadja Kresteva (34-jara kontistino) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Ĥaĝi Dimitar“ 16, v.h. A; Neli Hristova (17-jara lernantino), — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Ilija Carev“ 10 — interŝ. PM, fotojn de kantistoj kaj artistoj; Mariana Cvetanova (17-jara lernantino) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Z. Popov“ 16, ap. 3, interŝ. fotojn de artistoj; Kamelia Vladimirova (25-jara magazenistino) — 3400 Miĥajlovgrad, ul. „Hr. Botev“ 124; Aleksandar Kalistratov (50-jara kudristo) — 3400 Miĥajlovgrad, bul. „Banska Bistrica“ 29 — kolektas aŭto-revuojn; Dimitar Nikolov (11-jara lernanto) — 3401 Miĥajlovgrad, str. „Jelju Vojvoda“ 21.

Komercantaj esperantistoj (18—40-jaraj) — kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: 3400 Miĥajlovgrad, str. „Eltepe“ 5, Natalija Tiškova.

Tereza Stefanova (11-jara lernantino) — 3400 Miĥajlovgrad, str. „Ivan Bubenov“ 27 — interŝ. BK. E-lernantoj (15—16-jaraj) — kun samaguloj. Adreso de la gvidantino: u. Temelkovo, Pertiŝki okrag, EŝPU „Hr. Botev“, Cvetana Zareva.

Janka Milanova (35-jara kontistino) — v. Borovo, Rusenski okrag — pri ĉt.
 Nedka Naneva (55-jara artistino) — 5500 Loveĉ, bl. 202, v.h. E, et. 2 — pri muziko.
 Cvetomir Ivanov (14-jara) — 5500 Loveĉ, bl. „Canko Marinov“, v.h. A.
 Georgi Milev (14-jara) — v. Slavjani, Loveŝki okrag.
 Petko Davidov — 5500 Loveĉ — bl. 202, v.h. 4.
 Stojan Stojanov — v. Baŝovica, Loveŝki okrag.
 Ljoneo Ljonev — 5500 Loveĉ, zavod „Balkan“.
 Plamen Vasilev (18-jara) — 5500 Loveĉ, k. „Lenin“, bl. 26 kongres, et. 9, ap. 36 — pri disko-muziko.
 Verka Minčeva (28-jara) — 5500 Loveĉ, bl. „Mladost“, ap. 112, et. 1.

ĈEĤOSLOVAKIO

Ladislav Odehnal, Osová Bityška 165, 594 53 — interŝ. turismajn BK, gazetojn ktp.
 Du amikoj (50 kaj 60-jaraj) — kun bulgaraj, rumantaj, hungaraj samideanoj. Reciproka gastigado ebla.
 Komuna adreso: Francisko Machek, Ĉsl. armády, bloko 81, numero 2278, 434 01 Most.

GDR

Du junuloj el E-kurso deziras somere veturi al Bulgario kaj serĉas kontakton kun gejunuloj: 1) Thomas Falke (24-jara oficisto) — GDR 9700 Auerbach, Hohe str. 5; 2) Michael Döhler (24-jara studento) — GDR 9706 Rodewisch, str. der Jugend 4.
 Kvar knabinoj (10–11-jaraj) — kun ĉi pri bestoj kaj sporto, kolektas PM kaj BK. Komuna adreso: E-Laborrondo, Plonirdomo „Maksim Gorki“, GDR — 8300 Pirna, An der Gottlenba 1.

SOVETUNIO

E-kursistoj el Litovio — Komuna adreso: Henrikas Vaitkevičius, Taikos prospektas 23–17, 235802 Klaipėda — pri ĉi kun ĉi; Bronė Andziulienė (37-jara komercistino); Remigija Maciūtė (20-jara studentino); Laimute Janutyte (21-jara studentino); Vidmantas Atrumskis (22-jara oficisto); Arūnas Maksvytis (18-jara lernanto); Edvardas Tuzikas (30-jara inĝeniero); Zigmas Pocius (30-jara fotisto); Irena Kupienė (35-jara komercistino) kaj Asta Bikulčiūtė (19-jara flegistino).
 Aleksandro Kalaŝnikov, 334265 Artek, Krimeo. — Do vostrebavanija, Interesiĝas pri temo „Esperanto kaj internaciisma edukado de infanoj“, kun ĉi.
 Viktor Podolan (16-jara lernanto), Malij pereulok 13, p. Gorjačevodskij, 357560, Pjatigorsk — kun ĉi.
 Irina Zelenova (17-jara), 344010, Rostov na Don — 10, Teljman 50 — pri angla lingvo kaj Esperanto, pri trikado kaj vojaĝoj.
 Anoj de E-klubo „Tero“, ĉiuj el Jalta, 334200 — kun ĉi pri ĉi.
 — Urbanoviĉ Jelena (20-jara fraŭlino, muzikistino), str. Moskovskaja 49–33;

— Utkina Tatjana (26-jara fraŭlino, instruistino en kuraca gimnazio) str. Sečenova 33-7 — pri alpismo, turismo, speleologio;
 — Geedzoj Devjatovskij Nikolaj (31-jara muzikisto) kaj Devjatovskaja Svetlana (24-jara ekskursgvidantino) — sanatorij „Sosnjak“ 23;
 — Novosjolov Aleksej (15-jara lernanto) — str. Kirova 26–17;
 — Kuznecova Olja (13-jara lernantino) — str. Puškina 27–12;
 — Lavrentjeva Margarita (18-jara studentino) — str. Krupskoj 16;
 — Gulevskaja Svetlana (22-jara fraŭlino, apotekistino) — str. Dzerjinskogo 7–35;
 — Maksimova Tatjana (26-jara fraŭlino, instruistino de geografio) — str. 40 Let Oktjabrja 7–14.
 Denisov M. J. (inĝeniero), 174000 p/o Rogavka, Novgorodskij rajon, pr. Pionerskij, d. 2, kv. 18 — interŝ. monerojn.

Rjupina Julia (fraŭlino) — Izmail, Odeskoj obl., str. Lenina 15, kv. 2 — kun ĉi pri ĉi, kolektas bildkartojn, revuojn kaj insignojn.

Anatolij Borodin (31-jara) — SU-323500, Ukraino, Dnepropetrovskaja obl., Pokrovskoe, str. Karla Marksa 11 — interesiĝas pri radiotekniko, longdistanca televido, muziko, E-revuoj, fotografado, kolektas stampitajn poŝtmarkojn.

Erikas E. Laiconas (32-jara speleologo), 233000, Kaunas — c. Kestučio 3–8, Litova SSR — pri esplorado de kavernoj; interŝ. librojn, revuojn, publikaĵojn, prospektojn, bildkartojn, fotojn, poŝtmarkojn, insignojn kaj emblemojn pri kavernoj.

PARDONPETO

En n-ro 3/1982 sur paĝo 12 de „Bulgara Esperantisto“ estas allasita grava eraro: sur la publikigita foto ne estas lernantinoj el Gabrovo, sed el Pernik — el la fakultativa E-grupo ĉe gimnazio „Lenin“ kun kursgvidantino la direktorino Marica Popova.

La redakcio pardonpetas la gelernantojn el Gabrovo kaj el Pernik kaj iliajn instruistinojn Sonja Tihova kaj Marica Popova pro la allasita eraro.

Ni esperas, ke la publikigita sub la foto teksto: „Obstine kaj diligente lernas la Internacian Lingvon...“ rilatas ne nur la vervajn lernantinojn el Gabrovo, sed ankaŭ iliajn kolegojn el Pernik.

Ni bondeziras al ili pliajn sukcesojn en la lernado de Esperanto kaj atendas ilin en niaj vicoj kiel viglajn agantojn de nia E-movado.

La Redakcio

Sur la unua kovrilpaĝo:

La Panoramo en Pleven omaĝe al la rusaj soldatoj — liberigintoj de la bulgara popolo en la Rusa-Turka Milito en 1877–1878.

Redakta komitato:

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BAČEV, Vasil, BOROVSANIKI, Prof. Vasil ĈOČOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV, Lidia RAEVA.

Administrantino: Kalinka VASILEVA


Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
 1303 Sofio, Bulgario
 tel. 31-00-29

P. K. 66
 1 000 Sofio



PLEVEN—ANTIKA REGIO- NO DE NOVA BULGARIO

„En unu mallonga, sed seriozenhava rakonto „La vilaĝeto“ Emil Zola priskribas nekontan, kaŝitan de popoloj vilaĝeton, inter kies domoj gaje susuras pura torento. Sed ekflamis la milito, obusoj kaj kugloj disŝiris la kurtenon de densaj kaj altaj popoloj, sango kolorigis la torenton kaj hodiaŭ la nomo Vjort, la loko kie en 1870 la prusoj venkis la francojn, estas skribita per neforviŝeblaj literoj sur la paĝoj de la historio. Tio okazis ankaŭ en Plevna“.

Tiu komparo de d-ro Rian, atestanto de la eventoj dum la Rusa-Turka Milito en 1878 montras la lokon de Plevna en la historio. Ĝiaj spuroj kondukas nin al la novŝtona kaj ŝtonkupra epoko (7000—1900 jaroj antaŭ la nova erao). La primitivaj homoj eklogis la sekan groton en la loko „Kajlaka“. La arkeologoj asertas, ke ĉirkaŭ la groto ekzistis granda vilaĝo de traca deveno, de kiu konserviĝis du altaĵoj kaj traciaj argilaj ujoj. La Romia regado, firmigita en Mizija en la III-a jc de n. e., transformis vilaĝon Storgozia en fortikaĵon sur la grava tiutempe vojo de Plovdiv tra la Trojana pasejo al Ulpia Eskus (apud vilaĝo Gigen, situanta proksime de Danubo). Tie ekzistis antikva loĝloko kaj nun estas aranĝita muzeo. En la III jc Storgozia estas tipa romia urbo, sed en IV—V jarcentoj ĝi fariĝis riĉa predo por la barbaraj gentoj. Multfoje detruata kaj rekonstruata, la urbo supervivis la invadojn kaj ĉe imperiestro Justiniano ĝi estis renovigita.

La slavo alvenintaj ĉi-tien en la dua duono de la VI jc, nomis la loĝlokon en „Kajlaka“ Kamenec, kaj la duan loĝlokon, norde de Kajlaka (la nuna urbo) ili nomis „Plevna“. La invado de la osmanaj turkoj en la fino de la XIV jc por longa tempo ĉesigis la evoluon de la urbo.

Dum la osmana jago la loĝantaro konservas siajn naciajn trajtojn, siajn lingvon kaj nacian kulturon.

Dum la Renesanco vigligis la kleriga kaj kultura evoluo de Plevna. En 1840, dank'al la agado de la instruistino Anastasija Dimitrova komencas funkcii la unua en nia lando lernejo por junulinoj. Tiu lernejo nun estas portanto de ordeno „Georgi Dimitrov“.

En la komenco de majo 1869 Vasil Levski, la apostolo de la bulgara nacia revolucio, fondas en Plevna la unuan revolucionan komitaton.

La plej rimarkinda paĝo el la historio de Plevna estas la gravaj eventoj en la Rusa-Turka Milito en 1877—1878, konataj kiel Epopeo de Plevna. La 10-an de decembro 1878 je la 14-a horo sur la ŝtona ponto de rivero Vit, kvar kilometrojn for de Plevna, ekfliris blanka standardo. La turka militestro Osman paŝa kapitulacis antaŭ la rusa generalo Ganecki. Plevna triumfis. Triumfis tuta Bulgario.

En la periodo de kapitalisma evoluo en Plevna multnombriĝis la vicoj de la proletaro. Plevna estigis fortikaĵo de la sindikata movado, de la Bulgara Komunista Partio, centro de revolucionaj bataloj. En Plevna naskiĝis elstaraj partiaj gvidantoj — la talenta publicisto kaj popola defendanto Georgi Kirkov — La Majstro, Todor Lukanov, k. a. La 9-an de junio 1923 la plevnana proletaro, sub la gvido de la kuraĝa komunisto Asen Halačev ribelis kontraŭ la faŝisma puĉo. En la jaroj de kontraŭfaŝisma batalo Plevna estis centro de XI-a militoperacia zono. Pli ol 500 gefiloj de Plevna kaj de la Plevna-regiono pereis en la kruela batalo kontraŭ la kapitalismo. Pereis ankaŭ la flamaĵoj kaj sindonaj partizanoj-esperantistoj — la poeto Cvetan Spasov, Slavi Aleksiev, Mara Denčeva k. a. La 7-an de septembro 1944 plevnanaĵoj detruis la malliberejajn pordegojn kaj liberigis la popolaĵn batalantojn-kontraŭfaŝistojn.

La socialismaj tagoj de Plevna estas vico da sukcesoj en la evoluo de la urbo kaj en la prospero de la loĝantaro. Plevna kaj Plevna-distrikto — tiu antikva regiono de prosperanta 1300-jara Bulgario, estas elokventa bildo de ĉio farita de la popola registaro por plibonigo de la vivkondiĉoj kaj por disfloro de la nova soci-politika vivo.

La esperantistoj el Plevna kaj el Plevna-distrikto sindone laboras por la estonta gloro de Bulgario.

D-rino E. KANJOVSKA
V. GEORGIEV